

# LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ  
ADMINISTRADO:  
WEST-GRAFTDIJK  
(N.H.) NEDERLANDO  
ĜIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:  
NEDERLANDO:  
0,80 GULDENO  
ALIAJ LANDOJ:  
16 FR.FR; 0,70 DOL; 2,15V.FR.

## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

### LA KVARFOLIA TRIFOLIO.

Pro diversaj cirkonstancoj, Abdalah geedziĝis kun Leila, la virino, kiun li kun sia duonfrato Omar kondukis tra la dezerto al la kalifo. La kalifo permesis al Leila elekti kun kiu ŝi deziras geedziĝi, kaj ŝi preferis la noblan Abdalahn anstataŭ la riĉegan Omar. Pri tio Omar terure koleris, kaj kiam Kara-Ĉitan, la nigra satano, venis al li, kaj proponis por monsumo mortigi Abdalahn, por ke Omar povu forrabi Leilan, Omar lasis sin persvadi. Kara-Ĉitan estis la sama rabistestro, kiu dum la atako al la karavano kunportis Kafuran anstataŭ Leilan.

Estis en iu varma, nebula tago, ke Abdalah ripozis en sia ĝardeno, en la ombro de kelkaj citronarboj. Kafura kuŝis ĉe la piedoj de sia mastro kaj rigardis al li, kiel fidela hundo. En la tendo la patrino de Abdalah okupis sin pri bakado de panoj, dum Leila ion brodis per silkaj kaj oraj fadenoj. Ĉio elspiris kvieton kaj pacon.

Tiam la bojado de la hundoj anoncis vizitanton. Ĉe la enirejo de la ĝardeno viro haltigis sian kamelon kaj etendis la manon al Abdalah. Tiu paŝis al li, kaj diris kun orienta gastamo: „Estu bonvena. Via veno alportas al ni la benon de Dio. La tendo, kaj ĉio, kion ĝi enhavas, apartenas al vi.” Sed la nekonata respondis: „Mi eĉ ne unu piedon metos sur la teron, antaŭ ol vi ĵuris helpi min!”

„Vi estas mia gasto,” rediris Abdalah, „via vorto estas ordono por mi.” Kaj nun la fremdulo rakontis: „Mi estas malriĉa komercisto. Dum kverelo mi havis la malfeliĉon mortigi kontraŭulon. Mi ne estos sekura, antaŭ ol mi atingis Medinan. Nur vi, tiel oni diris

min, povas konduki min en tiun urbon. Mia vivo estas en viaj manoj. Decidu pri mia sorto.”

„Eniru mian tendon,” diris Abdalah, „post unu horo ni ekiros.”

„Sciu bone,” diris la fremdulo, „ke mi konfidas min nur al vi, ne al aliulo!”

„Nur mi,” rediris Abdalah, „akompanos vin. Mia kapo restos garantiaĵo por via savo.”

Nun la fremdulo eniris la tendon, kaj dum la patrino de Abdalah prizorgis lin, Abdalah eliris por pretigi sin por la vojaĝo. Tamen Kafura momenton haltigis lin. „Ĉu vi konas tiun viron?” ŝi demandis. „Ne, sed ĉu grave? Dio sendas lin al mi!” — „Li ne estas komercisto,” diris la servistino maltrankvile, „mi vidis liajn pistolojn, li estas militisto, ne fidu lin.” — „Soldato aŭ komercisto, kion ajn mi timu de nekonata rifuĝinto? Baldaŭ pretigu manĝon por ni.”

Kiam Abdalah revenis, Kafura estis metinta antaŭ la gasto tableton kun ĉiaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Daŭre ŝi observis la fremdulon kaj pripensis, kie ŝi jam antaŭe renkontis tiun vizaĝon. La nekonata tenis sin kviete kaj indifere, kvazaŭ li ne rimarkus, ke oni observas lin. En sia maltrankvileco Kafura fine volis havi certecon pri la fremdulo. Tiun vizaĝon ŝi senmaskigu. Ŝi prenis argilan vazon kaj faligis tiun post la komercisto, tiel ke ĝi rompiĝis. Timigite la viro sin turnis kun furioza rigardo. „Kara-Ĉitan” kriis Kafura, rigardante sian mastron.

„Tuj eliru,” ĉi tiu ordonis, „kaj ne diru tiajn frenezaĵojn!”

La kompatinda sklavino forrampis en angulon de la tendo. Kiam ŝi post kelkaj minutoj revenis kun varma teo, ŝi ne povis vidi ke tiu nomo emociis lin; li estis tutkvieta.

Dum la manĝo la gasto volis preni nenian manĝaĵon, kiom ajn Abdalah instigis lin, memorigante la longan kaj lacigan vojaĝon.

„Pardonu min,” li respondis, „mi ne havas apetiton, mi havas nur unu deziron, kiom eble plej baldaŭ foriri.”

„Salo donas apetiton,” kriis Kafura, kaj samtempe ŝi prenis plenmanon da salo, puŝis tion en la buŝon de la fremdulo kaj tiam rapide forkuris en la ĝardenon.

„Senhontulino!” kriis Abdalah, „mi punos vin pro via impertinenteco,” kaj kolere li postiris ŝin. Plorante Kafura tiam diris : Batu la hundon, kiu avertas vin, kaj karesu la ŝakalon, kiu minacas vin. Ĉu vi do ne konas tiun komerciston?” — „Oni ne suspektu gaston,” diris Abdalah. Tiam li denove altabliĝis.

„Via sklavino instruis min pri ĝentileco,” diris la gasto, „mi ja

ne povas ne honori vian gastamon." Kaj nun li appetite manĝis, dume tre afable parolante.

Fine venis la momento de foriro. „Mastro," diris Kafura, „ĉu vi ne kunprenas vian pafilon?" — „Ne," estis la respondo, „tio estus ofendo al mia gasto. Nenion timu. Kiun Dio gardas, tiu estas bone gardata. Kiam mia onklo Hafiz venos hejmen, petu lin, ke li dum mia foresto gardu la tendon. Mi konfidas vin ĉiujn al li." Kaj kun la lanco en la mano Abdalah ekiris, piedirante flanke de la fremdulo sur lia kamelo.

Kiam ambaŭ estis profunde en la dezerto, la rajdanto ĉirkaŭrigardis ĉu ili estas solaj, tiam metis manon en sian zonon kaj ludis per la tenilo de sia pistolo.

„Mi esperas, estimata gasto mia," diris Abdalah, „ke vi pardonos al mi la malsaĝecon de tiu knabino."

„Se ŝi estus mia sklavino," estis la respondo, „mi severe punus ŝin."

„Oni estu iom pardonema por tiuj, kiuj nin amas," rediris Abdalah. „Kafura pensis, ke min minacas granda danĝero, kaj por savi min de tio, ŝi senintence ĝenis vin. Ŝi devigis vin manĝi de mia salo, por ke ni estu amikoj en ĝojo kaj ploro. Tia kutimo ja certe ankaŭ en via lando ekzistas?"

„Ĉe ni," estis la respondo, „tia anikeco daŭras nur unu tagon. Sed kiam pasas la posta tago, sen ke oni manĝas el la sama plado, ni estas liberaj malami unu la alian."

„Nu, mia gasto," diris Abdalah ridante, „morgaŭ vi do povos mortigi min. Post kiam mi savis vian vivon. Ĝis tiam mi estos sub via gardo, kaj al vi la tasko protekti min kontraŭ ĉiuj."

„Tion mi ja faros," respondis la fremdulo kaj silentadis. Tamen li pensis : „Tiu beduino pravas. Ankoraŭ havante la salon de gastamo en mia stomako, mi ne povas mortigi lin. Tio estus krimo. Sed kiam la suno subiras, komencas nova tago. Tiam mi havos la rajton fari kion mi volas."

Dum la tuta vojaĝo li rigardis Abdalahn, kiu kviete promenadis. „La fido de tiu viro ĝenas min," pensis la fremdulo. „Mi bone povas mortigi malamikon, sed ne sufoki ŝafon. Kaj krome, por tiom malmulta mono. Prefere mi por la duona sumo mortigus Omar."

Tamen, kiam la suno estis subironta, la komercisto plirapidigis la iron de sia kamelo, por sekrete ŝargi la pistolojn. Poste li kaŝis la brakojn sub la mantelo kaj atendis. Nun venis la momento. Sed kiam li turnis sin, Abdalah iris al li, milde prenis la bridon de la

kamelo, kaj sternis du tapiŝetojn sur la sablon. „Frato,” li diris, „estas la horo de la vesperpreĝo. Ni kune preĝu.”

„Mi neniam preĝas,” estis la respondo.

„Vi mirigas min, estimata gasto! Mi opiniis vin alia. Ĉu vi do ne portas, same kiel mi, surbrake amuleton, kiu forpelas la danĝerajn fantomojn? Kaj ĉu vi ne scias, kion ĝi enhavas?”

„Jes, mi havas talismanon,” diris la vojaĝanto. „Antaŭ dudek jaroj mia mortonta patrino donis ĝin al mi. Estas la sola objekto, kiun mi ankoraŭ estimas. Pli ol unufoje ĝi ŝirmis min kontraŭ la morto.”

„Kaj ĉu vi do forgesis la du savantajn ĉapitrojn, kiujn via patrino elektis por vi, kaj kiuj estas la forto de tiu talismano?” Kaj solenvoĉe Abdalah diris : „En la nomo de la favorkora kaj kompatema Dio. Mi serĉas rifuĝejon ĉe la Sinjoro — kontraŭ la malico de la kreitaĵoj, kiujn Li kreis, kontraŭ la malbono de la nigra nokto, kontraŭ la malamo de la envianto.”

„Paco estu kun vi,” kriis la komercisto. „Ĉu tio estas la vortoj, kiujn la patrino donis al mi?” Kaj tutanime aŭskultante Abdalahn, li remetis la pistolojn en sian zonon.

Abdalah daŭrigis deklami el la korano : „En la nomo de la favorkora kaj kompatema Dio, mi serĉas rifuĝejon ĉe la Sinjoro de la homoj — kontraŭ la malico de tiu, kiu pensigas malbonon, kiu blovas malbonan en la korojn de la homoj, kontraŭ la fantomoj kaj kontraŭ la homoj.”

„Kiu tion diras?” rediris la fremdulo. „Kiu tiel legas en la koroj?”

„Estas Dio mem,” diris la pia beduino. „Ni apartenas al Li. Se Li deziras nian domaĝon, niaj piedoj portos nin tien, kie la morto atendas nin. Se Li deziras nian bonon, la morto falas antaŭ Li, kiel vundita leono.”

„Ĉu vi do neniam timas la morton?”

„Ne. Kie Dio ordonas, ĉiu antaŭzorgo estas vana. Estas du tagoj, en kiuj estas vane sin armi kontraŭ la morto : Estas la tago, en kiu Dio al la morto ordonas faligi nin, kaj estas la tago, en kiu Dio malpermesas lin proksimiĝi al ni.”

„Oni ĉiam povas timi la nekonatan horon, kiu forprenos nin.”

„Ne, se oni sekvis nur la Dian vorton. Certe via patrino, same kiel mia ripetis por vi la vortojn de niaj saĝuloj : „Memoru, ke en la tago de via naskiĝo ĉiuj ĝojis, kaj nur vi ploris. Vivu tiel, ke en via lasta momento ĉiuj aliaj ploras, kaj nur vi ne havas larmojn

por verŝi. Tiam vi ne timos la morton, en kiu ajn horo ĝi venu.”

„Vi estas stranga popolo,” flustris la nekonata. Kaj senpense li metis manon sur pistolon.

„Ni estas la popolo de la profeto, ni sekvas lian instruon. Antaŭ ol vi metis piedon sub mian tendon, mi rekonis vin, Kara-Ĉitan. Vi estas mia malamiko, vi venis al mi sub falsa nomo, la celon de via vojaĝo mi konis, nenio estus pli facila al senigi min de vi; sed vi petis gastamon de mi, Dio metis vin sub mian protekton, jen kial mi akompanis vin, sola kaj sen armiloj. Se vi havas malbonajn intencojn, Dio gardu min; se vi estas amiko, etendu la manon al mi.”

„La infero kaptu min, se mi trafus la viron, kiu indulgis min,” kriis Kara-Ĉitan. „Jen mia mano, estas mano de soldato, kiu bonon traktas per bono, kaj malbonon per malbono.”

Jam momenton poste la rabistestro bedaŭris siajn vortojn. Rigardante la talismanon li diris en si : „Tiu malbeninda amuleto tiel senfortigis min.” Tiam li tiris la aĵon de sia brako.

„Kapitano,” diris Abdalah ni iru pli profunden en la dezerton, se vi ne deziras renkonti la alproksimiĝantan karavanon.”

„Ne,” respondis Kara-Ĉitan,” kontraŭe, mi aliĝos al ĝi. Nun mi ne plu bezonas vin. Kion mi rekompence donu al vi? Jen, prenu ĉi talismanon. Vi ne scias, kiom vi ŝuldas al ĝi, vi ne scias, kiom kostas al mi. Adiaŭ, kaj se oni iam diros al vi, ke mi estas mal-kuraĝulo, ne forgesu, ke mi estis via gasto kaj via amiko.”

Tiam li rapidigis sian rajdobeston kaj foriris. Abdalah post-restis, pensante pri tiuj strangaj vortoj, kies signifon li ne komprenis. Nun, restinte sola, li unue volis ligi la ŝirmantan talismanon ĉirkaŭ sian brakon. Li pririgardis ĝin. Estis malgranda perkamenta rulaĵo. Sur unu el la flankoj oni kudris malgrandan pecon da veluro, kaj sur ĝi estis fiksita malgranda ora objekto.

Abdalah eligis ĝojkrion. Li ne povis erari — estis la tria folieto, la trifolio estis kompleta.

Nun li nenion plu havis por serĉi surtere — la diamanta folieto estis en la ĉielo.

Goje li ekiris hejmen, dezirante renkonti siajn amatan patrinon kaj edzinon, siajn amatan onklon Hafiz kaj ankaŭ la fidelan Kafuran.

**Por komencantoj.****LI JA PRAVAS.**

La lernejestro turnas sin al la malgranda Karlo kaj demandas : „Kiom da tagoj estas en jaro?”

„Sep,” estas la tuja respondo. La aliaj infanoj laŭte ridas.

La instruisto kolere krias: „Mi demandas en jaro, ne en semajno!”

La malgranda Karlo restas tute trankvila kaj diras : „Estas sep : Dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato. Nombro mem, estas precize sep, kaj pri aliaj tagoj la instruisto neniam parolis.”

Tekselo (Ned.).

A. SPAANS.

**GRANDAJ PENSOJ.**

Mia amiko devas esti tutmonda amiko (Lessing).

Nur tiu estas vera amiko, kiu restas amiko en malfeliĉo.

Justa vojo — ĉiam plej longa.

Ju pli malplena kapo, des pli multekosta ĉapo.

Pli multe da homoj mortas pro tromanĝado ol pro malsato.

Unu bona patrino anstataŭas cent instruistojn (Herbart).

Trad. V. Sirtautas (S. ĉiurlioniene).

El „Litova Stelo”.

**LA FELIĈA ESTAJO.**

Iun tagon la Eternulo diris : „Tedas min aŭskulti plendojn de ĉiuj flankoj! Jen, mi faros unu estaĵon feliĉa.”

Li rigardis la mondon kaj alvokis blankan birdon, kiu malĝoje sidis sur branĉo. Tiu birdo nek havis neston, nek amikon. La Eternulo diris al ĝi : „Mi volas, ke vi estu feliĉa. Kion vi deziras?”

„Ĉionpova Eternulo,” respondis la blanka birdo, „donu al mi fortajnflugilojn. Permesu al mi flugi laŭ la vojo, kiun la suno iras.”

„Bone,” diris la Eternulo. „Kion vi faros, se vi atingos la sunon?”

„Sinjoro,” ree diris la blanka birdo, „permesu al mi flugi laŭ la vojo de la suno. Mi deziras ĉiam havi la sunon antaŭ la okuloj, kaj... neniam atingi la sunon.

Trad. M. D.

El „Litova Stelo”.

## LA PASERO.

Iam mi promenis en mia ĝardeno. Mia hundo estis ĉe mi. Subite ĝi haltis. Poste ĝi rampis pluen. Kio estis? Sur la vojo kuŝis birdeto. Pro la vento la besteto falis el la nesto. Nun ĝi estis senmove. Sur laflugiloj preskaŭ ne estis plumoj. Tre malrapide mia hundo iris al la birdeto. Sed subite aflugis la bird-patrino. Ŝajnis, kvazaŭ ĝi falis el la ĉielo. Ĝi estis tuj antaŭ la nazo de la hundo. Ĝi pikis al la hundo. Tiu larĝe malfermis la buŝon. La birdo defendis la infanon. La tuta korpeto tremis pro timo. La patrino estis en granda danĝero, sed volis savi la etulon. Ĝi sovaĝe kriis. Por ĝi la hundo estis giganta monstro. Sed tamen ĝi atakis la grandegan beston. La hundo haltis kaj poste malrapide iris malantaŭen.

Mi vokis la hundon kaj foriris kun respekto en la koro. Certe, mi sentis respekton por la malgranda, kuraĝa birdo kaj por ĝia profunda amo.

### Respondu al jenaj demandoj :

Kie mi promenis? Kiu estis kun mi? Kio okazis? Ĉu la hundo kuris rapide? Kion la hundo vidis? Kial la birdeto kuŝis en la ĝardeno? Ĉu ĝi havis multajn plumojn? Ĉu la bird-patrino vidis la hundon? Kion ĝi faris? Kiun la patrino defendis? Ĉu la birdo-patrino estis en danĝero? Kion faris la hundo? Kial ni respektas la malgrandan birdo-patrinon?

## TIEN KAJ REEN SUR KANON-KUGLO.

„Ni atakis,” rakontis barono Von Münchhausen, grandan urbon (la nomon mi forgesis) sed ni ne povis venki ĝin. Nia generalo volis scii, kio okazas en la urbo. Sed estis malfacile enpenetri en ĝi, ĉar ĉie staris gardistoj. Neniu el niaj soldatoj kuraĝis. Nur mi trovis rimedon veni en la urbon. Kion mi faris? Mi grimpis sur la tubon de kanono, kaj kiam soldato pafis, mi saltis sur la kuglon. Kiel la fulmo mi flugis tra la aero. Tamen mi pensis : „Enveni en la urbo estas facile, sed kiel forlasi ĝin? La malamiko certe kaptos kaj pendigos min. Tamen mi ne volis morti. Subite mi vidis kuglon, kiun la malamikoj pafis al ni. Per grandega saltego mi saltis sur ĝin kaj revenis ĉe miaj amikoj. Mi do ne atingis mian celon, sed savis mian vivon. La generalo tre admiris min. Poste mi aŭdis, ke la malamika generalo mortis pro teruro, kiam li vidis min.

### Respondu al jenaj demandoj :

Kiu rakontas la historion? Kion oni atakis? Kio estis la nomo de la urbo? Ĉu oni venkis? Kion la generalo volis scii? Ĉu oni eniris la urbon? Kiu provis iri en la urbon? Kion li faris? Ĉu li venis en la urbon? Kial ne? Kiel li revenis? Kio okazis al la malamika generalo?

Folio el someraj tagoj...  
 Mi kunprenas ĝin sur miaj vagoj  
 Por ke ĝi iam al mi diru en la valo  
 Kiom bele kantis la najtingalo;  
 Kiom verda estis la mont-arbaro,  
 Tra kiu iris mia piedoparo.

Hartberg (Germ.).

Alois POSTL.

### GRAVA VIZITO EN HOSPITALO.

Prezidanto Lincoln iam dum milito vizitis hospitalon. Estis agreble por la soldatoj vidi lian afablan vizaĝon kaj aŭdi kelkajn vortojn. Kion li diris sonis tiel milde, kiel la vortoj de intima amiko. En lito No 26 kuŝis dek ses-jara knabo. Li havis gravan vundon kaj ne plu povis longe vivi. Sinjoro Lincoln staris ĉe la lito kaj dum li prenis la palan manon de la knabo, li demandis per mallaŭta, patrina voĉo : „Kompatinda knabo, ĉu mi povas fari ion por vi?”

La knabo fiksis siajn grandajn, senkulpajn okulojn sur la vizaĝon de la prezidanto kaj demandis : „Ĉu vi volas skribi al mia patrino?”

„Volonte,” respondis Lincoln. Li petis plumon kaj inkon kaj eksidis ĉe la lito de la malsanulo. Estis longa letero. Kiam ĝi estis preta, la prezidanto diris : „Mi baldaŭ portos ĝin al la leterkesto. Ĉu mi eble povas alimaniere helpi vin?”

La knabo respondis : „Ĉu vi volas resti ĉe mia lito, ĝis la fino? Mi sentas, ke mi baldaŭ mortos.”

Tiuj vortoj trafis la prezidanton en la koro kaj larmoj venis en liaj okuloj. La malsanulo ne movis sin kaj ne plu parolis. Estis antaŭ la kvara horo, kiam la prezidanto eksidis ĉe li kaj ne pli frue ol je la sepa venis la fino. Tamen la prezidanto sidis tie, kvazaŭ li estis la patro de la knabo : li daŭre karesis la manon de la malsanulo. Kiam venis la mortkoloro sur la vizaĝon de la knabo, la granda viro klinis sin super li, fermis liajn okulojn kaj malĝoje rigardis la kvietan vizaĝon. Al ĉiuj viroj, kiuj estis en la hospitalo venis la larmoj en la okulojn.

#### Tasko :

1. Kopiu kaj traduku en vian gepatran lingvon ĉiujn rakontojn en la rubriko „Por komencantoj”.
2. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de : „La feliĉa estaĵo” kaj „Grava vizito en hospitalo”.
3. Lerne parkere : „Li ja pravas” kaj la poemeton supre je p. 94.



## EL NIA MOVADO.

**Norvegujo** : Dum la unua duonjaro 1938 la norvega gazetaro aperigis 1.237 artikolojn kaj atikoletojn pri Esperanto, kontraŭ 875 dum la sama periodo 1937. Do, progreso !

**Svedujo** : En oktobro ĉ. j. Eldona Societo Esperanto en Stokholm festis jubileon de sia 20 jara ekzistado. E.S.E. eldonis ĝis nun 73 diversajn librojn kaj broŝurojn en preskaŭ 250.000 ekzempleroj. Imitindaj ciferoj!

**Francio** : Per cirkulero la franca ministro pri Aviado permesis organizi esperanto-kursojn ĉe la aviad-armeo, ekster la deĵorhoroj. Jam de kvar jaroj funkcias laŭvaloj Esperanto-kursoj ĉe la Supera Lernejo pri Aviado.

**Denaska Esperantistaro.** Jen nova entrepreno, kiu celas eduki la infanojn tiel, ke ili iĝu „laŭnaturaj esperantistoj”, kiuj same facile parolas Esperanton, kiel la nacia lingvo. Ĝi elektas ĉiuloke „onklinon”, kiu elserĉas esperantistajn familiojn, interrilatas kun ili, kaj helpas al la gepatroj eduki la infanojn kiel „dulingvulojn”. Jen nova devizo : „Esperanton en la familiojn”.

Adr. sekr. : S.ino J. W. Neal, 48, Elvendon Rd. N. 13, London (Angl).

**31-a Universala Kongreso de Esperanto 1939 en Bern,** 29 Julio-5 Aŭg. Ĝis 7. XI aliĝis 158 personoj el 20 landoj. Oficiala kongresgazeto : „Ni Vokas Vin”. Ĝin ricevas senpage ĉiu kongresano. Leteradreso : 31-a U. K. de Esperanto, Bern, Svislando.

**La foiro de Lyon uzas Esperanton.** La direkcio de la Int. Foiro de Lyon ankaŭ en 1939 uzos Esperanton por la korespondado kaj reklamo, kaj por la informado de vizitantoj. La foira oficejo eldonis jam grandan varb-afiŝon kaj propagandajn sorb-paperojn kun Esperanto-tekstoj. La venonta kunveno okazos de 11-21 marto 1939.

**Heroldo de Esperanto, No 1000.** La semajna gazeta „Heroldo de Esperanto” aperis la 20-an de novembro kun verda kapo. La kaŭze de tiu eksterordinara koloro estis la fakto, ke la novembra numero estis la 1000a. Pri tio la redaktoro Teo Jung povas esti fiera, kaj elkore ni deziras ke restu lia miriga optimismo, kiu ebligas la senripozan laboron al nia internacia, semajna Esperanto-gazeto.

**Nederlanda Komitato por la praktika aplikado de Esperanto.** La komitato fondiĝis en kunveno en la haga urbdomo; ĉeestis la urbestro de Hago, S.ro de Monchy, la ĝenerala direktoro de la ned. P.T.T., reprezentantoj de l'ned. industrio, ktp. La ĉefa celo de la komitato estas, per esperanto logi eksterlandanojn al Nederlando. Sekretariejo de la komitato estas la Int. Cseh-Instituto, Riouwstr. 172, den Haag.

**Esperantlingva parto en granda filmo.** En la plej grava usona filmfabriko Metro-Goldwyn-Mayer estas farata granda filmo sub la titolo „Idiot's Delight” (Amuzo de idioto). En tiu filmo parto de la dialogoj estos esperantlingva.



## INTERNACIA JUNULARKUNVENO

### TERVUREN (7-14 aŭgusto).

La kunveno okazos 7-14 aŭg., verŝajne en la malnova vilaĝo Tervuren, 13 km. de Bruselo. Ĉi tiu loko kuŝas flanke de (preskaŭ en) la granda kaj belega Zoniënwood.

En Tervuren estas nova kaj vigla esperanto-grupo, kiu certe bone helpos. Ni sendube ankaŭ trovos helpantojn en Bruselo.

Tervuren estas meze de la lando, do facile ni povas fari ekskursojn al kiu ajn direkto. En Tervuren estas interesa muzeo pri Kongo kaj bela parko.

Ĉijare ni atendas multe pli da partoprenantoj ol la antaŭan jaron, pro tio S.ro Rainson (prezidanto de la flandra esp. ligo) serĉis lokon, kie estas grandaj hoteloj. Verŝajne ni do dormos en lernejo kaj tagmanĝos en hotelo.

S.ro Rainson baldaŭ elektos komitaton en Tervuren por aranĝi la feston. La administrado estas same kiel antaŭan jaron ĉe „La Juna Vivo”.


Bonvolu senprokraste anonci vin por la junular-festo, por plifaciligi nian laboron. Aperu do longega listo en la februara numero. Ni fidas, ke ĉiu esperantisto kun ĝojo sciigos pri la plano kaj laŭeble subtenos ĉi tiun entreprenon. Ni do afable petas personojn aŭ grupojn, kiuj finance povas helpi, sendi sian donacon al la red. de „La Juna Vivo”. Ni raportos pri tio en la gazeto.

### LASTA ADMONO.

Post 1 februaro ni prezentos kvitancojn al la nederlandaj abonantoj, kiuj antaŭ tiu dato ne pagis sian kotizon por la jaro 1939.

Sur la kovertoj de la eksterlandaj abonantoj ni ankoraŭfoje presigis la daton, je kiu finiĝis ilia abono. (Atentu la liston da abonantoj en la antaŭa numero).

**JARKOTIZO „LA JUNA VIVO”** : Britujo, 2 ŝil. 6 p.; Belgujo, 14 fr.; Ĉeĥoslovakujo, 17 Kcs.; Danujo, 2.50 kr.; Estonio, 2.50 kr.; Finnlando, 25 finn. mk.; Francujo, 16 fr. fr.; Italujo, 10 l.; Jugoslavujo, 25 din.; Norvegujo, 2.50 kr.; Polujo, 3.20 zł.; Svedujo, 2.20 kr.; Svisujo, 2.10 fr.; Usono, 0.70 gld. En landoj, el kiuj oni ne rajtas sendi monon eksterlanden, oni povas pagi per 6 respondkuponoj. (Adresoj de „La Perantoj” paĝ. 88).



Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Ĝiro 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Koedijk (N.H.). Ĝiro 310334.

Anglujo : S.ro J. W. Holland, 61 Vandyke Rd, Leighton-Buzzard, Beds.

**Simpatiuloj (en Nederlando)** : En ĉi tiu numero ni presigis la belan vazon, destinita por la amik(in)o, kiu varbis la plej multajn simpatiulojn. (F. M. gravuros en ĝi belan desegnon).

Ĝis nun ni enskribis 50 simpatiulojn. Tamen ni tute ne estas kontentaj pri tiu rezulto kaj pro tio prokrastis la daton ĝis la 15-a de februaro 1939. Komprenu, ke en aŭgusto ni atendas pr. 400 junajn homojn en la Internacia Junularkunveno en Belgujo, kaj por bone akcepti ilin la komitato bezonas multan monon! Bonvolu konsideri tion kaj alporti vian brikon por tiu belega festo.

**Simpatiuloj en aliaj landoj** : Ni presigis ankaŭ 1000 varbokartojn esperante, kaj instigas ĉiujn eksterlandajn T.J.O.-anojn serĉi simpatiulojn inter amikoj kaj parencoj. Ankaŭ por ili ni havas surprizon. Simpatiuloj pagas jare 40 cendojn (8 Fr. fr.; 1 ŝil.; 6.60 B. fr.; 1 Sv. fr.).

**Filmservo** : Por Nederlando ni farigos novan kopion. Laŭ la raporto de S.ro Schut montriĝis, ke la diversaj grupoj prezentis la filmon ĝis januaro 14-foje (Nombro da vizitantoj pr. 1000). En Januaro ĝi estas ĝis nun mendita 9-foje.

Ankaŭ S.ro Holland en Anglio sendis brilan raporton pri la filmprezentado tie.

Multe ni esperas, ke baldaŭ ankaŭ la esperantistoj en aliaj landoj uzos ĉi tiun belegan propagandilon. Kopio de la filmo kostas 50 guldenojn.

**„La Peranto inter la Perantoj”**. La unua No jam elĉerpiĝis, tial ni farigis la 2-an numeron en pli granda kvanto. Interesuloj povas ricevi ekzempleron po 5 cendoj.

**„La Juna Vivo”-legantoj** kiuj pagas 1 gld. anstataŭ 80 cendojn, estas samtempe anoj de T.J.O. (Tutmonda Junular-Organizo), ricevos membrokarton de la sekretario, rajtas partopreni en la Internacia Kunveno.

**Insigno** : En nia estrarkunveno de la 18-a de decembro en Amsterdamo ni decidis eldoni la belan, diverskoloran insignon, desegnitatan de F. M. La prezo estas 30 cendoj (afrankite). Bonvolu baldaŭ antaŭmendi ĝin.

**ORNAMU VIAN SKRIBPAPERON PER LA BELA T.O.J.-GLUMARKO !**

**Donacoj** : Kelkaj esperantistoj en Laren (N.H.) : 1 gld.; F.ino K. en Laren (por filmkopio) : 1,00 gld.; F.ino v. V. en Alphen a/d. Rijn : 1 gld.; F. M. en Leerdam : 0,65 guld.; S.ro H. en Buzzard (Angl.) : 0,38 guld.; F.ino G. en Wemeldinge (Ned.) : 1,10 guld.

Ilustritaj kartoj : S.ro J. V. en Zaandam : 0,50 guld.; G. T. en Petten : 0,25 gld.; S.ro H. en Leighton Buzzard (Angl.) : 1,25 guld.; S.ino O. R. en Purmer (Ned.) : 0,15 guld.

**Novaj eldonoj** : En la estrarkunveno ni decidis eldoni propagandcele kiom eble plej multajn nederlandajn eldonojn por ne-esperantistoj. Komprenoble, se ni sukcesos, ni daŭrigos en aliaj landoj.




---

„La Juna Vivo” deziras al ĉiuj legantoj prosperan kaj feliĉan novjaron.  
Ni ne povas persone respondi al la multaj bondeziresprimoj.

# ENIGMOJ

Al ĉiu radiko el la unua serio, aldonu la sufikson „ero” kaj vi ricevos duan serion da vortoj. La unua serio konsistas el 2-silabaj vortoj.

## 1-a serio

parto de la korpo  
organika fluaĵo  
riskita sumo en konkurado  
ripoza meblo  
kava cilindroforma ilo  
malvivo  
hepeta sekrecio

## 2-a serio

forta agito de animo  
dolĉa substanco  
sato de atmosfero  
signo de skribado  
ŝvelaĵo  
miksaĵo por kunigi ŝtonojn aŭ brikojn  
antikva rema kaj vela  
militŝipo

Soissons (Franc.).

J. BOURNICHE.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Solvojn ni akceptos ĝis 1 marto 1939.

## LA SOLVO EL No 5.

**Esperantujo.** — Edeno — stelo — pluvo — ereto — ringo — azeno — negro — tendo — utilo — Jezuo — okulo.

La premiojn gajnis : S.ro Toorneman en Deventer (Ned.); F.ino Karlsson en Göttenborg (Sed.).

## INSEKTOJ KONTRAŬ HOMOJ (daŭrigo).

### Ankaŭ en Eŭropo io simila.

La plej multaj homoj opinias, ke nur la ekstereŭropaj teritorioj suferas pro insektinvadoj. Tio estas nur parte ĝusta; rektaj murdistoj ne estas la eŭropaj insektoj, escepte de la malario-muŝo. Sed ili tre diligente „laboras” ĉe la detruo de nutraĵ- kaj industri-artikoloj. La malbonfama ojstro (muŝo), kiu kelkfoje ankaŭ en Germanujo montras sin, atakas la bovojn. La muŝo metas siajn ovojn en la haŭton de la kompatindaj bestoj, post kio ekestas ulceroj. Kiam tiuj ulceroj malfermiĝas, la haŭto estas plena je truoj. En la plej multaj kazoj oni tuj devas buĉi tiujn bovojn kaj la haŭtoj estas senvaloraj. La ojstro en Eŭropo povas kaŭzi malutilon de milionoj.

Wien (Germ.).

F. M.

### La sekvoj de la \*akrid-invadoj.

Oni legas en gazetoj ofte pri akrid-svarmoj, kiuj atakas grandajn teritoriojn. La leganto preskaŭ neniam profunde pripensas tion. Li nur pensas : Abomeninda bestaro. Ke post tiaj akrid-invadoj ofte dekmiloj da homoj mortas pro malsato, pri tio malmultaj pensas. Kaj tamen estas tiel. Kaj ĝuste sur la plej malriĉajn ter-regionojn ĵetas sin la akrid-svarmegoj. En la sudaj partoj de Nordameriko aperis antaŭ ne longa tempo akrid-svarmo, kiu post la teren-falo kovris teritorion de 2.000 kvadratkilometroj. La svarmo estis 100 km. longa kaj 20 km. larĝa. Eĉ ne unu trunketo restis! Svarmoj, kiuj estas 30 km. longaj, kaj 20 km. larĝaj, tute ne estas maloftaj, kaj la enloĝantoj de Alĝerio, Tunizio, kaj Maroko pli timas la akridojn ol ĉion alian.

Vieno (Germ.).

F. M.



## RICEVITAJ ESPERANTAJOJ

**VARTEJOJ**, originala romano de N. Bartelmes. 128 paĝoj. Form. 13×18 cm. Prezo f 0,80. (Ĉu la viro en ĉi romano agis kondamninde aŭ ne, pri tio juĝos ĉiu leganto laŭ sia propra temperamento. Certe la psikologia kaj morala problemo ĉi tie pritraktita de l' aŭtoro sub romana formo estas delikata, kaj eble la ombro en tiu ĉi libro estas pli forta ol la lumo.)

**KIA MIKSAJO**, originala komedio en unu akto, de F. V. Dorno. Tre gaja teatraĵo, parte esperant- kaj parte nederlandlingva. Eld. Flandra Esperanto-Instituto, Magdalenastraat 29, Kortrijk (Belg.). Prezo : 0.35 gld.

**PER MOTORCIKLO EN TRI LANDOJ**, de Gösta Henriksson, ilustris Rud. Demuth. 38 paĝa; formato 13 × 19½ cm. Eld. Eldona Societo Esperanto en Svedujo. Prezo 0.45 guld. (afrankite). Taglibra priskribo de vojaĝo, kiun kvar svedaj gesamideanoj faris per 2 motorcikloj, de Malmö tra Danlando kaj Germanujo al esperantistaj amikoj en Ĉeĥoslovakujo kaj returne.

**SUPLEMENTO AL LA IEL-JARLIBRO**, 32-paĝa broŝuro, enhavanta la ŝanĝojn en la adresoj de la delegitoj (novaj delegitoj, adresŝanĝoj, ekŝiĝoj) kaj raporton pri la 30-a Universala Esperanto-Kongreso, kiu en 1938 okazis en Londono.

**VIVASEKURA ASOCIO**, 4-paĝa propagandilo, esperantlingva, pri la viva-sekura asocio de la nederlanda instruista Societo, senpage havebla, ĉe : Prinsengracht 963, Amsterdam-C.

**„LA UNUIĜO SEN NOMO“** de H. de Greeve, Katholika Sacerdoto, trad. el la ned. lingvo P. A. M. van Strien. Malgrandformato, 30 paĝa broŝuro, senpage akirebla ĉe la tradukinto en Oosterhout (Nederlando).

**ESPERANTO-KALENDARO**, poŝtkartformato, dukolora preso. **Poŝtpapero** kun kovertoj kaj poŝtkartoj kun esperantoflago. Eldonis H. E. O., Abcoude (Ned).

\* Akrido estas saltinsekto.

# KORESPONDADRESOJ

**Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.**

**Anglujo** : Junaj fraŭlinoj (18 jaraj) dez. kor. kun gejunuloj en Svisujo. Adr. : F.ino Dorothy Young, 102, Langstone Rd. Warstock, Birmingham 14.

**Ĉeĥoslovakujo** : S.ro Ant. Podsednik, Letovice 50, dez. kor. kun ĉ. l., pri ĉ. t.; interŝ. p.m. Abelkulturisto. Resp. certa. Validas ĉiam.

**Francujo** : Por ekhavi junajn gekorespondantojn turnu vin al : Ch. Le Séach', eksdirektoro de supra lernejo, Créac'h Maria Izella, Loc Maria Quimper, Finistère.

**Francujo** : S.ro Delahaye Robert, 71 rue Wilson, Somain (Nord), 18-jara fraŭlo, dez. kor. kun gesamaĝuloj en ĉiuj landoj, pri ĉ. t.

**Francujo** : S.ro Jurkowski Lucien, 9 Sentier de Somain, Fenain (Nord), 16 jara fraŭlo, dez. kor. kun samaĝuloj en ĉ. l., pri ĉ. t.

**Francujo** : Galowiez Charles, 16 rue Casimir Périer, Fenain (Nord), 18 jara, dez. kor. kun samaĝuloj en ĉ. l., pri ĉ. t.

**Francujo** : Knabinoj, 12-14-jaraj deziras korespondi, sed nur grupe. Skribu al : F.ino Lepachelet, instruistino, Somain (Nord).

**Francujo** : 40 gimnazianoj, mez-lernejaj, tekniklernejaj, de Esp. grupo „Collège Municipal”, Chalons-sur-Marne, deziras interkorespondi.

**Francujo** : Grupo Edukistara (G. E. E.) ĉiam havigas al vi adresojn de korespondantoj (pr. geinstruistoj). F.ino Jeanne Dedieu, str. Belfort 13, Prades (Pyr. Or.). Sciigu ŝin pri via adreso, aĝo, profesio, temoj, ktp.

**Nederlando** : Kiu sendas al mi sian fotografajon, ricevos unu de mi. Resp. certa S.ro Eddy Rademakers, 21-j. instruisto, Pauluspolder, Vogelwaard (Z.).

**Nederlando** : 15-jara knabo (T.J.O.-ano), serĉas kunulojn por tende-vojaĝi al la junularkunveno en Belgujo. Adreso : A. v. Hengel, Abcoude.

**Nederlando** : 23-jara bakistservisto volas kor. kun bakistoj en ĉ. l., pri la pli interna parto de bakejo. S. Kuiper, Nw. Laagzijde B 47, Schagen.

**Nederlando** : F.ino A. Wiarda, Violierstraat 26c, Rotterdam (Z.), dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

**Nederlando** : Els Vorst, 17-jara knabino, Holleweg G 82, Heiloo, deziras korespondi. Respondas certe.

**Skotlando** : S.ro Emile Lentz, profesoro, 82 Blenheim Place Aberdeen, serĉas korespondantojn por siaj 60 gelernantoj (plejparte 15-16-jaraj komen-cantoj).

**Usono** : Esp. klubo de altlernejo ĝojus ricevi pakaĵon de leteroj (10 aŭ malpli) de nederlanda grupo. Certa resp. Adr. : S.ro G. Falgier, Winchester, Illinois.

**Nederlando** : S.ro D. Vuist, Camstrastr. 1, Leeuwarden, 16-jara, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo garantiata.

**Svedujo** : Mi dez. kor. kun ĉiuj mondpartoj. Prefere per let.; interŝ. fotojn, pm., kaj div. monerojn. Skribu ĉiuj kelkajn vortojn nur al mi. Certa respondo. F.ino D. Lind, Mantrop.

**Nederlando** : 21-jara F.ino dez. kor. p. let., kaj interŝ. il. poŝtkartojn kun ĉ. l. F.ino A. Westrik, Magelhaenplein 11 hs., Amsterdam-W.

**Nederlando** : F.ino Bets Oostwoud Wydenes, Abbekerk, A103 (N.H.), farmistfilino 26-jara, dez. kor. per ilustr. poŝtk. kaj leteroj.

**Nederlando** : 15-jara knabo dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Kol. poŝtmarkojn. Skribu al : Piet Boon, Laantje 2, Leerdam.

**Nederlando** : F.ino Fien Brill, Visschersdijk 39l, Winschoten (21-jara), dez. kor. kun ĉiuj landoj.

---

### ANONCETOJ.

**SKRIBA KURSO POR A KAJ B** (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto A. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Weesperzijde 3, p/a. Nieveld, Amsterdam.

**INTERNACIA LERNOLIBRETO „LA JUNA VIVO”**, la plej taŭga kaj malkara por komenckursoj. Tre favoraj recenzoj. Kursgvidantoj petu specimenon! Prezo 20 cendoj. Ĉe mendo de almenaŭ 20 ekz. la prezo estas po 16 cendoj plus afranko.

**KALENDARO POR 1939**. Sendu al viaj gekorespondantoj kalendaran poŝtkarton por 1939. Klarlegebla, dukolere presita sur bona kartono, ĝi estas ŝatata donaco, kiun la ricevinto volonte uzos tutan jaron; tial ĝi estas unu el la plej taŭgaj kaj malkaraj propagandiloj. Prezo afr. : 20 ekz. por hgld., 0,44; 100 ekz. po hgld. 1,76 Specimene 5 ekz. po hgld. 0,12<sup>1/2</sup> aŭ unu resp. kup. Du modeloj haveblaj : No 1101, presita laŭlonge; No 1102 presita laŭlarĝe. Eld. H. E. O., Abcoude, Holando, Poŝtkonto 88015.

**INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”**. Belaspekta libreto, praktika formato. Enhavo : 34 kantoj kun muziknotoj. Prezo 0,35 guld., 2 ekz. por f 0,50.

**ARTISTINO**, estas la 12-jara knabineto Undine von Medvey, el Hamburgo. Ŝian artan programon kompletigas kelkaj prezentaĵoj de la patro. Ili pretas prezenti sian programon en esp. kluboj. Por detaloj oni turnu sin al : D.ro Otto von Medvey, Artistenpension Holman-Hos, Amstel 128, Amsterdam.

**MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO**. Libretoj 32-36 paĝoj po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvidantoj rajtas peti specimenon. Mendebila al „La Juna Vivo”.

**BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO”**. Tre taŭga materialo por komenc- kaj daŭrigkursoj. Prezo : Jark. '34/'35 : guld. 0,65, jarkolektoj '35/'36 kaj '36/'37 : po guld. 0,55. Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. la prezoj estas po 55 kaj 45 cendoj.

---

**Grava peto** : Tiuj, kiuj povas malhavi numerojn de la 4-a jarkolekto, bonvolu sendi ilin al la adm. de „La Juna Vivo” en West-Grafdijk. Ĉar multaj petis ilin, kaj nia stoko elĉerpiĝis.